

BULGARA ESPERANTISTO

Organo de Bulgara esperantista asocio


Rekomendita de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 1870 de 27. I. 1922.

Jarabono: 20 bulgaraj levoj, 1 svisa franko, 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.
Adreso: Poŝtkesto 233, SOFIA (Sredec), Bulgarujo!

Jaro XVI

Majo-Junio 1935

№ 9-10



La centro de la bulgara ĉefurbo el aeroplano

Ĉiuj al nia ĉarma Varna!

Nia fidela samideanaro festos jam trian fojon sian kongreson — la 21—23. julio n. j. — en la bela marurbo. Varna delonge estas mondkonata por ne bezoni specialan priskribon. Ni tutkore invitas ĉiujn enlandajn kaj najbarlandajn esp.



organizojn sendi delegitojn kaj gastojn. Ili certe havos belajn tagojn en la fama kuraĉloko, kiu somere transformiĝas en vera Babelturo, pro la multaj fremdlandaj bangastoj. Tiel ĝi fariĝas plej fruktodona kampo por esp. semado.

Kompreneble, por havi abundan kaj bonan rikolton, ne devas manki kuraĝaj koroj kaj sindonaj al la afero animoj. Ni venku nian egoismon kaj klopodu plenumi nian devon al la granda ideo. La ideo ne kreskas sen martiroj, ĝia sukceso postulas oferojn. Ni donu ilin kaj ne pensu pri rekompenco, ĉar „maldanko estas rekompenco de l'homaro“. Ni nur semu, senprofite, pri l'tempoj estontaj pensante.

Ni do ariĝu en Varna grandare kaj montru al la skeptika mondo, ke esperanto estas vivanta, kunfratiga lingvo kaj meritas ĉies helpon por la bono de l'homaro.

Do, ĉiuj levu alten la verdan standardon kaj envagoniĝu al Varna — la nigramara reĝino kaj esperanta kongresurbo. Bonan vojaĝon kaj ĝis revido tiel!

B. E.

Mihail G. Palmov

Spirito de granda revoluciulo Hr. Botjov

Estas io surda, ho panjo, en brusto...
Io mankas al mi malhele, eterne...
Estas io frosta, malgaja... pezkrusto,
Pezajon de peno mi portas interne...

Min izolis io de l'suno de oro,
Kaj min apartigis de la firmament',
Jam aer' ne estas por mi, nek la koro
Ĝuas teran mondon kaj de l'tera gent'...

Io min izolis de ribela kanto,
Kaj min apartigis de mia Balkan',
Kie plu ne pafas brava ribelanto,
Por malfermi vojon al gent'-uragan'...

Transe de la vivo mi estas sen ĉojo,
Transe de l'batalo kun tera malbon',
Transe de la bono, transe de la vojo,
Plenigantaj vivon per reva la son'...

Trad. P. Jordanov

Нека не си затваряме очитѣ за реалноститѣ и да не се стрѣскаме отъ филологически призраци. Есперанто вече живѣе, принципитѣ му сж издържали суровия изпитѣ на живота, и ние можемѣ да си пожелаемѣ поскорошно тържество на това скромно оржие за свещенитѣ права на човѣка.

Проф. Д-ръ Мих. Арнаудовѣ

RUBRIKO POR INFANOJ

Stel — Diĵon

Revu, junularo!

Revu, revu, junularo,
Pri pli justa estonteco.
Iru, agu en la lumo
De la revo.

Ĉar mi vidis flui larmojn,
Nun vi revas ilin viŝi.
En la koro krede gardu
Vian revon.

Revu, revu, junularo,
Revu bele, revu forte,
Havu ĉiam la rigardon
Al la revo.

Tamen, ho ve! restas ploroj,
Sed revante, vi penados,
Igi vivon la plej eble
Kiel revo.

PAŜTISTO KAJ CIGANO

Humoraĵo

Foje paŝtisto formelkis sian ŝafaron kaj komencis kuiri la lakton. Post kiam la lakto estis kuirita, li verŝis por si grandan pladon de la lakto, metis frean flanon kaj sidis tagmanĝi.

Tiutempe preter la ŝafejo pasis cigano.

— Bonan tagon, paĉjo! — salutis li la paŝtiston.

— Donu Dio bonon, Mango! Kien vi vagas tra nia regiono?

— Marŝante, — respondis la cigano, — mi rimarkis vian ŝafejon. Tre malsata mi estas kaj mi venis ĉe vi por ke vi donu al mi ion manĝeti.

La paŝtisto ekdeziris ŝerceti kaj diris:

— Kion vi volas, Mango: nur panon aŭ nur lakton? Respondu al mi nur per unu vorto kaj mi donos!

La cigano ŝetis rigardon al la bela flano, al la lakto kaj sopiris. Post momento kun brilantaj okuloj li ekkriis:

— Miksaĵon, paĉjo, miksaĵon mi volas!

La paŝtisto ekridis pro la saĝeco de la cigano kaj gastigis lin bone.

E. Killian

Lupo diris al leporo:
„Venis via lasta horo,
Mi vin tute manĝos kun
Bona apetito nun.“

„Ha, la leporeto krias,
Stulta lupo, ĉu vi scias,
Se vi provas tuŝi min,
Mi terure batos vin.“

Lupo, kapskuante miras,
Ne komprenas kaj foriras,
Jen la leporeto sidas
Pri la lupo gaje ridas.

* * *

En Afriko la simio
Kun papago tre diskutis.

Ĝin papago, ho je Dio,
Per insultoj superŝutis.

Eĉ flugadi vi ne scias,
Portas simplan aĉan veston.

Vere, mi vin ne envias,
Vin la plej malsaĝan beston.

LEONO KAJ ĜIA MILITISTARO

Ĉio servas por io.

Foje la reĝo de l'bestoj, la leono, kolektis grandan militistaron. La leono vicigis ĝin kaj invitis la urson trarigardi.

La urso preterpasis la tutan militistaron, trarigardis ĝin, sed, veninte al la fino, ĝi ekridis.

— Kial vi ridas, urso? — demandis la leono.

— Ne, feliĉa reĝo, mi ne ridas pro via militistaro, sed mi miras, kion serĉas ĉi-tie la azeno kaj la leporo, — respondis la urso? — Per kio ili povas servi al vi? La azeno — malvigla kaj ol la leporo pli granda timemulo ne ekzistas!

— He, urso, — diris la leono — ankaŭ ili estas necesaj. La azeno blovigis la trumpeton por kunvenigi la militistaron, kiam ĝi disiĝos en arbojn kaj valojn, kaj la leporo estos bona kuriero kaj rapide transdonos miajn ordonojn ĉien.

El bulgara: N. M. Kocev

Iv. H. Krestanov

Fragmentoj el „TRA EŬROPO PER ESPERANTO“

III.

La „fremdulo“ en Baĉkovo

Dum la somero 1930. Mi gastis en la plej pitoreska kaj varmbanriĉa parto de mia patrolando — Ĉepino. Post vizito de la pomak^{*)} vilaĝo Kurova, mi deiris en la pure bulgara Kamenica. Tie-ĉi „la pravilaĝanoj pli volonte ŝtoniĝus ol turkiĝi“, de kie la nomo de ilia loĝloko (Kamen — ŝtono). Estis baldaŭ tagmezo. Mi eniris en la mineralbanejon. Tie banis sin unu sola persono.

En la baseno ni interkonatiĝis — li estas sekretario de la komerca gimnazio en Plovdiv. Aŭdinte, ke mi estas ŝtatekzamenita lektoro de fremdaj lingvoj, li ekscitite demandis min, ĉu mi konas francan kaj germanan. Post mia jeso, li, kvazaŭ Arĥimedo, volis eliri el la banejo kun la ĝojkrio „Ευρηκα“, kaj informi sian direktoron, ke li „malkovris“ . . . Trankviliĝinte, li sciigis al mi, ke la komerca gimnazio jam delonge serĉas profesoron de ambaŭ lingvoj, devige instruataj en ĝi kaj demandis min, ĉu mi akceptus tiun postenon. Kvazaŭ por konsentigi min, li klarigis al mi, ke la dirita gimnazio estas la plej granda kaj moderna siaspeca konstruaĵo en la tuta lando, ke ĝi estas miksitita — geknaba, ke la salajro estas pli alta, ĉar super la ŝtata estas ankaŭ alpago de la loka komerc-industria ĉambro . . .

Mi ekloĝis en la dua bulgara ĉefurbo, kiel instruisto ĉe la komerca gimnazio. La lernjaro komenciĝas la 15-an de septembro. Post kelkaj tagoj estis foiro pro templa festo en la fama Baĉkova monaĥejo, nemalproksime de Plovdiv. Estis bela dimanĉa frumateno. La filo de mia domomastrino, ĵus reveninta el Francujo juna bulgara inĝeniero, proponis al

mi viziti tiun pentrindan lokon de nia bela patrujo. Post duonhora trajnveturado ĝis Stanimaka (nun Asenovgrad) kaj duhora piedmarŝado ni alvenis en la monaĥejon. Aro da monaĥoj afable renkontis kaj gvidis nin. Pro mia aparta kostumo, ili konsideris min ankau inĝeniero. Ilian gastamecon kaj la monaĥejan belecon oni devus mem ĝui kaj vidi por kompreni nian kontentecon.

Estis jam la 11-a h. antaŭtagmeze, kiam ni, la juna inĝeniero kaj mi, eniris la apudan poŝtoŝtacion. Ĉar, laŭ deziro de mia akompananto, mi parolis nur france, li devis traduki mian deziron aĉeti poŝtmarkojn. Tial la poŝtestro ekopiniis min fremdulo kaj demandis bulgare, ĉu mi parolas esperanton. Aŭdinte la lastan vorton, mi tuj respondis:

— Jes, sinjoro!

— Sijka, Sijka! ekkriis li, kaj el la apuda ĉambro eliris juna belulino.

— Nun mi vidu vin, edzino mia, kiom vi scipovas esperanton; la sinjoro estas fremdulo, komprenigu vin . . . kvazaŭ mokride diris li.

La kompatinda sinjorino ŝajne ne ektimis, kolektis siajn fortojn kaj en bulgar-esperanta lingvaĵo klarigis al mi, ke en la vilaĝo Baĉkovo mem estas kelkaj samideanoj: la intruistino Mara Ibrišimova, la sekretario de la komunumo Georgi Popov k. a. Ĝoja kaj fieraj, ke mi komprenis ŝin, ŝi eĉ iom akompanis nin survoje.

Post duonhoro ni troviĝas en la vilaĝo. Malgranda vilaĝaneto-lernanto montris al ni la domon, kie loĝas la instruistino. Bela, duetaĝa domo, autau kiu gaja ĝardeno kun bonodoraj floroj kaj fruktarboj, kurbiĝintaj de ekscitigaj fruktoj. Ricevinte unu levon da trinkmono, la vilaĝaneto ĝoje krias:

— Fraŭlino, instruistino, oni serĉas vini

Baldaŭ ĉe la korta enirpordo aperas ĉarma junulino. Kun feliĉa mieno kaj ruĝiga scivolemo ŝi demandas, kiuj ni estas.

*) Pomak estas pene turkigita bulgaro, kiu konfesas la mohamedanan religion, sed parolas kaj kantas la plej puran bulgaran lingvon. La pomakoj loĝas en la Rodopa-montaro, suda Bulgarujo.

Mia akompananto prezentas sin, kaj mi, devigita ludi la rolon de fremdulo, diras:

— Mi estas esperantisto...

— Ha, kia piezuro por mi, kaj el kiu lando vi estas? demandas ŝi en bona esperanto.

— Mi estss el Esperantujo, kaj mian naciecon vi povas mem diveni, kara samideanino.

— Franco... ne, ... italo... ne, ... embarasiĝis ŝi kaj, observante mian sportkostumon, tuj aldonas: germano vi estas!

Kontente ŝi invitas nin — maloftajn gastojn — en sian knabinan ĉambreton sur la dua etaĝo, sidigas nin sur la sofion kaj ekrukulas jen en bulgara kun mia kamarado, jen en esperanto kun mi... Estas jam tagmezo. Ŝi volas gastigi nin, tial lasas nin rigardi ŝiajn „ilustritajn poŝtkartojn el la tuta mondo“ kaj iras en la kuirejon. Post duonhoru ŝi kaj mia kamarado ĝumanĝas freŝan fiŝon frititan, kaj mi bongustajn fruktojn sukoplajn...

Ŝi ne povas esprimi sian grandan kontentecon paroli unuafoje la internacian lingvon kun fremdulo kaj bulgare ekpetas mian kamaradon restigi min la tutan posttagmezon, ĉar ŝi volas montri al ni la belajn ĉirkaŭaĵojn, la „Ruĝajn rokojn“ kaj peti al mi kelkajn klarigojn pri germana lingvo, kiun ŝi eklernis antaŭ nelonge... Ŝi ĝenas sin proponi tion senpere al mi, kaj mia kamarado devas delikate traduki al mi ŝian peton, kion li volonte faras, apenaŭ retenante sian ridon.

Posttagmeze nia gastigantino fiere kondukas nin ĉe siaj gekonatuloj: ĉe ŝia nemalpli ĉarma kamaradino Vera ni manĝas konfitaĵon, ĉe samideano Popov ni trinkas kafon, ĉe aliaj acidlaktfluidaĵon k. a. Ĉiuj kzvazaŭ gluis sin al la „fremdulo“ — bulgara malforta flanko troŝati alinacianojn —, ĉiuj rapidis montri al mi siajn fremdlingvajn konojn, mi ja estis la ĉefpunkto de l'atento. Fraŭlino Vera estas finstudinta la Loveĉ'an amerikan kolegion kaj volonte babilas angle, Popov refreŝigas siajn esp. konojn, kaj ia ŝtonĉizisto siajn italajn. Baldaŭ grupiĝis ĉirkaŭ ni deko da gesinjoroj, kaj la ĉeftemo fariĝis, kompreneble, la internacilingva problemo.

Ni eliras ekster la vilaĝo. Min enkadris Mara kaj Vera survoje al la „Ruĝaj rokoj“. Alproksimiĝinte la arbareton, ambaŭ kamaradinoj ekmalpacetis: Mara volis resti sola kun mi kaj petis Vera'n iri al mia kamarado. Ŝi havis kaŭzojn por tio: ŝia gasto kaj samideano mi estas kaj miajn esp. kaj germ. lingvokonojn ŝi volas profiti...

Sur erikejo en la arbareto. Idilie. Sidigintaj unu apud alia, mi sentis min kvazaŭ Hamleto apud Ofelio. Mara parolis al mi longe pri la bulgara lando kaj popolo, kantis al mi kelkajn naciajn kantojn, petis de mi kelkajn klarigojn pri la germana, kaj reciproke, laŭ mia deziro, lernigis al mi kelkajn bulgarajn frazojn, kiel: Dobar den gospoŝo! (Bonan tagon, sinjorino), Tova e mnogo hubavo (Tio ĉi estas tre bela), Az obiĉam vaŝata strana (Mi amas vian landon). Sed ŝi ne sukcesis korekti mian „germanan“ prononcadon de b, d, g, ŝ, s, v, kiuj, sonante al mia buŝo kiel p, t, k, ŝ, z, f, kripligis la belajn vortojn kaj ridigis la aŭskultanton... Fine ŝi kantis al mi en esperanto bulgaran popolkanton, „Bela vi, arbaro mia“. Al mia miro, kiu ĝin tradukis, ŝi sensuspekte respondis:

— Ha, nia granda samideano Ivan Krestanov! Eble vi renkontis lin ie dum viaj vojaĝoj?

— Ĉu vi konas lin persone? demandis mi iom ĝenite.

— Ne, sed mi legis kaj relegis liajn verkojn „La bulgara lando kaj popolo“, kaj „Bulgara antologio“, kiujn mi varme rekomendas al vi. El ili vi multon lernos pri niaj naciaj ĝojoj kaj suferoj, moroj kaj kutimoj ktp. Ŝi eĉ promesis al mi donaci iun el tiuj verkoj. Sed mi afable malkonsentis, akceptante nur unu nacie broditan poŝtuketon kaj mankiseton...

Estis jam la 5-a posttagmeze, kiam buŝfajfoj anoncis, ke la disirintaj tra la arbaro kaj montaro paroj devas regrupiĝi.

Survoje al la vilaĝo nia dekduo deiris belan ĝardenon de drinkejo. Tie ni iom refreŝiĝis per senalkoholaj trinkaĵoj kaj fotografiĝis à la minute. Sur la

pretaj fotokartoj ĉiuj devis subskribigi sin „por rememoro“. Ha nun, ĉu fino de mia devigita ludo de fremdulo jam ekestas!? — traflugis penso la kapon. Sed ne, la mano maŝinsimile subskribis laŭvole germanigitan mian nomon: J o h a n n K r e u z m a n n ! kaj mi libere ekspiris.

Neniu suspektis mian „germanecon“.

Je la 6-a h. vespere ni jam estis en la bela laŭbo, ĉirkaŭkreskita per vinberujoj, antaŭ la loĝejo de samideanino Mara. Ŝia domomastrino estis preparinta vegetaran vespermanĝaĵon: tomatojn kun rizo, salaton kaj fruktojn. La manĝaĵo estis tiel bongusta, ke mi ne povis deteni min fari merititan komplimenton en mia „bulgara“: — Brafo, gospoŝo, tofa e mnoko ĥubafo!

Tiu ĉi frazo ŝajnis esti la kulminacia punkto de mia „germaneco“, ĉar ĉiuj tondre aplaudis, kaj la ventro de mia akompananto — la inĝeniero apenaŭ ne krevis pro rido. Kompreneble Mara rikoltis ne malmultajn laŭrojn, ĉar ŝi estis mia instruistino de la bulgara...

Kun dorssakoj plenigitaj per grandaj piroj, pomoj, prunoj, persikoj, vinberoj ktp. de la malavaraj gedomomastroj kaj akompanitaj je kelkaj kilometroj ekster la vilaĝo de la afablaj gesamideanoj, ni — mia akompananto kaj mi — rapidis

piede al la stacidomo de Stanimaka kaj de tie trajne al Plovdiv. Nepriskribebla estas la ridego de mia domomastrino kaj ŝiaj tri filinoj, kiam je la 10-a vespere la juna inĝeniero rakontis niajn travivaĵojn, kiuj al ili ŝajnis tro multaj por unu sola tago.

— — — — —

Post unu semajno mi estis invitita letere de la esp. societo en Stanimaka fari publikan paroladon pri lingvo iternacia. Feliĉe nek tie, nek en la urba salono ĉeestis iu el Baĉkovo. Alie mia situacio estus tre malfacila, precipe kiam la prezidanto min prezentis al la publiko per mia vera nomo, anoncante, ke mi parolados pri la lingvo, en kiu antaŭ unu semajno, laŭ diro de Baĉkovanoj, iu germano parolis kaj amuzis ilin... „Kaj se tiu germano, scianta plurajn lingvojn, lernis ankaŭ esperanton kio do restas por ni, simplaj mortemuloj, sciantaj nur nian gepatran!“ konkludis alvoke la prezidanto, transdonante al mi la parolon.

Bone, ke en tiu ĉi horo min vidis neniu Baĉkovano. Tion mi kaj esperanto ŝuldas al la pluvo, utila ankaŭ por la abundaj semaĵoj kaj vinberoj, tiel famaj en tiu fruktoriĉa kaj bela regiono. Krome, kiuj konis min kun barbo, tiuj ne povis rekoni min sen barbo.

Преди години азъ бѣхъ на мнение, че езици като Волапюкъ, Есперанто и др. п. сж неестествени, изкуствени, съставени по поржчка и като такива сж мъртви и не могатъ да иматъ успѣхъ между живи хора, които говорятъ само на живи езици.

Сега азъ виждамъ, че Есперанто е съставенъ твърде добре и успѣшно се разпространява бързо по цѣлия свѣтъ; и за всѣки народъ той е сравнително лекъ за разбирање, при малко старание и изучване.

Нека Есперанто цѣпти и се разпространява навсѣкжде, за да спестяваме енергия, време и пари, които да употребяваме за съвършенствуването си! Дано дочакаме това благословено идеално време, когато всѣки човѣкъ ще е длъженъ да знае само два езика — родния си и Есперанто!

Д-ръ Н. С. Кирчевъ — Хонолулу (Хавайскитѣ острови)

Умразата между народитѣ е странно нѣщо. Въ първитѣ степени на културата тя винаги се показва най-силна и остра. Но има степенъ, дето тя съвършено изчезва, дето човѣкъ като че стои надъ народитѣ и чувствува щастието на съседния народъ като свое.

Гьоте


На 6. и 7. Юлий т. г. въ Русе ще се състои северобългарска есп. конференция. Пжтуване съ 70% отстжпка по Б. Д. Ж.

De Popo Bogomil al Petro Dánov

Latina proverbo diras: Ex orient lux — el oriento venas la lumo. Tio ĉi tre pravas pri Bulgarujo. Antaŭ deko da jarcentoj la bulgara pastro Bogomil kreis la pure kristanan soci-renovigan movadon — bogomilismen, kies adeptoj en fremdlando estas konataj sub diversaj nomoj: kathari, patareni, albigeois k. a. Ĝiaj adeptoj — la bogomilanoj — persekutitaj ĉe ni, portis okcidenten lumajn pensojn kaj ideojn pri libereco, egaleco, frateco, pri kiuj fieras la francoj de la tempo de la granda revolucio. Iam bulgaroj mortis por Dia penso, kaj ankaŭ nun ne mankas tiaj bulgaroj, inspiritaj de larĝa demokrata spirito.

Parenca al la bogomilismo, sed memstara kaj tre sukcesanta estas la t. n. dânovismo aŭ „blanka frataro“ en Bulgarujo. Ĝia kreinto estas Petro Dánov, naskita la 29. junio 1855 en v. Nikolaevka apud Varna. Li absolvis gimnazion en Varna, studis filozofion kaj medicinon en Usono kaj post sia reveno en Bulgarujo, dum 12 jaroj faris esplorojn frenologiajn. Poste li dediĉis sin al pure spirita laboro — predikado kaj vivado en harmonio kun siaj komprenoj pri la vivo. Li estas do protagonisto de la nova doktrino, kiun oni volis konsideri kiel religian sekton. Esence la dânovismo estas nur aperigo en nova formo de la eterna mistika instruo pri la Dia Amo, kiun ĉiuj majstroj kiel Manuo, Budhao, Kristo kunportis siatempe en alia formo. Konsiderinda parto de la predikoj kaj prelegoj de Dánov estas stenografiitaj. Kelkaj (ĉirkaŭ cent) el ili estas presitaj en bulgara kaj aliaj lingvoj, inter alie tri serioj en esperanto-biblioteko „Nova Kulturo“. Li — nomata Majstro — havas disĉiplojn kaj skolojn en preskaŭ ĉiuj Eŭropaj landoj, en Ameriko, Japanujo k. a. En Bulgarujo liaj disĉiploj kaj adeptoj nombras kelkdekojn da miloj el ĉiuj klasoj de l'socio.

Lia instruo estas optimista-pragmatika kun profunda mistika fundamento. Dánov mem estas ekskluziva naturo. Oni atribuas al li supernaturajn ecojn de klarvido, scio, kuraco ktp. Lia bela figuro kun regulaj trajtoj inspiras respekton, memorigante



la figuron de Dio sur iuj malnovaj ikonoj. En nia lasta n-ro ni donis de li rakonton, kaj ĉi-sube kelkajn pensojn.

Pensoj de Petro Dánov

Per ŝtelo oni ne povas vivi. La nuntempaj homoj vivas pli per ŝteloj, tial ankaŭ ilia vivo estas plena je malfeliĉoj kaj suferoj. Ŝteloj estas ankaŭ en la nutrado. Iu buĉas bovon aŭ ŝafon kaj ilin formanĝas — tio estas ŝtelo.

Kiel devas ilin ami la aliaj — la homoj komprenas; kiel devas ili ami la aliajn — tion ili ne komprenas.

Kiu povas ĝoji pri la etaj aferoj en la vivo, tiu estas granda homo.

Homo devas vivi en plej favoraj kondiĉoj, kiujn li mem povas krei al si. En tio ĉi nome kuŝas la grandeco de l'homo.

Famaj verkistoj estas tiuj, kies lingvo estas penetrita de Amo.

La pureco estas eco de l'homo. La bestoj ne povas esti puraj, sed homo ĉiam povas esti pura. Mi parolas pri la interna pureco — pureco en pensoj, en sentoj kaj en deziroj.

Tr. I. H. K.

Lumaj pensoj

Kiu kredo estas prava? — Tiu, kies aŭtoritato estas la amo.

Tenu vin ĉe ĉio, kies aŭtoritato estas la amo, kaj vi neniam pekos.

Dio monon ne donas, sed — saĝon.

Se vi havas saĝon, monon vi trovos.

Se vi ne havas saĝon, vi perdos la monon, kiun vi havas.

Kiu havas amon, tiu havas forton.

Oni devas ami la homojn, ĉar la ani-

moj eliras el unu kaj sama fonto.

Ni devas venki ĉiujn malfacilaĵojn en la vivo.

Ĉion faris la homoj, nur la amon ankoraŭ ne aplikis en sia vivo.

Nia mondo estas mondo de senamo.

Fidu je tiu spirito, kiu eliras el Dio kaj penetras vian menson.

Libera estas nur tiu homo, kiu servas al Dio kaj faras Dian volon

Tr. M Kraev

Prof. D-ro Miĥail Arnaudov

Dancado sur fajro

(Gaste ĉe la nestinaroj)

Al ĉiuj, kiuj vizitis la Nigra-maran bordon de Sozoplo ĝis Midia kaj la arbarajn sinojn de Stranĝa-montaro kun multaj bulgaraj kaj grekaj vilaĝoj kaj konatiĝis pli bone kun la vivo de la tiea loĝantaro, faris fortan impreson la rakonto pri la tiel nomitaj nestinar'oj.

stinarajn vilaĝojn, por senpere pristudi la strangan religian travivaĵon kaj propraokule vidi la plenumon de siaspeca kristan-pagana mistero.

La 2-an de junio mi ekiris per veturilo de Vasiliko al vilaĝo Urgari, 22 km. internen, meze de jarcentaj fagaj kaj



Dancoj ĉe la fonto

Kaj kiuj vidis la nestinarojn mem, kiel ili faras sian antikvan diservon kaj sian ekstatikan dancon sur fajro, tiuj restis frapitaj de simila religia kulto, ĉe kiu en la XX-a jarcento la miraklo konkurencas kun la profunda kredo.

Leginte priskribojn de la nestinara rito de kelkaj kompetentaj observantoj kaj pridemandinte sur la loko mem multajn fidindajn atestantojn, dum la somero de la pasinta jaro mi vizitis denove la ne-

kverkaj arbaroj. Survoje mi rimarkis ofte la nekonatan aliloke arbuston „vinko“ kun ĝiaj helverdaj folioj kaj belegaj violkoloroj. Ĝi rememorigas la oleandron kaj la figarbon. Alveninte en la vilaĝo, mia unua zorgo estis konatiĝi kun la „vekilo“ de la nestinaroj, t. e. kun la 68-jara Kiro Kostadinov, kiu ĝis antaŭ nelonge estis oficiala reprezentanto de la religia komunumo kaj ĉefgvidanto de la rita ceremonio. De li mi sciigis, ke la mor-

gaŭan tagon, tiun de Sanktaj Kotsantino kaj Helena, kiam estas la templa festo de la preĝejo, okazos la tradicia procesio al la „ajazmoj“ (sanktaj fontoj) kaj la vado en la vivan brulkarbaĵon.

La 3-an de junio matene mi vidis, post la liturgio en la preĝejon eliri el tie tri feste vestitajn knabojn kun ikonoj (sankt-figuroj) surŝultre kaj la novan vekilon, marŝantan antaŭ ili kun incensilo enmane. La procesio pasis rapide trans la placo kaj eniris en la je 150 metroj starantan preĝejon de la nestinaroj, nomatan „Ĉefejo de Sankta Konstantino“. Mi ankaŭ eniris tien. Tio estis malgranda, duon-malhela ĉambreto, en kies fajrujo brulis fajro, kaj sur la murbreto staris ikonoj. Sur la muro pendis la sankta tamburo, kiu estas malpendigata kaj batata nur en tiu tago. Kelkaj maljunaj virinoj bruligis vakskandelojn sur la tripiedo kaj krucsignis. Inter ili la ĉefrolon ludis avino Nuna, tromaljuna virino kun simpatia mieno, ĝis antaŭ nelonge „ĉefnestinarino“. De la tuta vilaĝo, feste vestitaj geviroj eniris en la kapelon, bruligis vakskandelojn, portis donacojn (tukojn, kandelojn) kaj stariĝis ekstere por atendi la procesion al la sanktfontetoj.

Post signalo de avino Nuna, oni venigis la sakfajfiston, prenis la tamburon kaj ĉio pretiĝis por ekiro. Kiam ekmuzikis la sakfajfistoj kaj la tamburo, ekestis io neatendita por mi. Kelkaj nigrevestitaj virinoj, mortepalaj, silentaj ĝis nun, subite eksplodis en histeriajn kriojn „Vâh, vâh“, kiuj alarmigis kaj sankttremigis ĉiujn rigardantojn. Sub la sonoj de la speciala nestinara muziko, ia „raĉencia“, ili komencis salti ritme diversflanken, krii pasie, kun etenditaj antaŭen aŭ supren manoj, en transo, „afekciigitaj“, kiel diris la vilaĝanoj. „Pli forte, pli rapide la tamburisto!“ kriis avino Nuna kaj la vigla danco plenigis per teruro vilaĝanojn kaj urbanojn, surprizitajn de tiu ekstatika krizo, kiu altrudiĝis rigore kiel profunda kaj sincera travivaĵo. La surdiga muziko, la ĝemoj de la nestinarinoj en transo, laodoro de la incenso, la mistera cirkonstancaro — ĉio min transportis en la sia-specan atmosferon de antikva kulto, kie estis konataj la samaj „afekciigoj“ kaj la samaj dancoj. Tio daŭris kvaronhoron. Post kiam la danco ĉesis, la pro-

cesio kun la ikonoj ĉefrolante, la nestinaroj post ili kaj la tuta popolamaso ekiris al la sanktfonteto de S-ta Konstantino, ekster la vilaĝo, en la valo de la rivero, inter centjaraj fagoj.

Akvosanktigo apud la fonto; aspergo; trinko de benita akvo kaj manĝo de benita pano, rita popoldanco por sano kaj reveno en la vilaĝo, kun novaj „afekciigoj“ de la nestinaroj survoje.

La plej interesa estis la vespero. Je la 18-a h. oni faris grandan fajron sur la placo, kiu fortiĝis kaj plenardiĝis je la 20-a h. Estis jam malhele. Pluvetis kaj povis esti malhelpita la plej grava rita plenumo, la krono de la festo. El la „ĉefejo“ de S-ta Konstantino eliris denove la procesio kun la ikonoj kaj nestinaroj kaj direktiĝis rapide al la fajro antaŭ la preĝejo. Sakfajfistoj kaj tamburo bruegis nekredeble, la brulkarbaĵo brilis hele. La ikonportantoj ekstaris unuflanke, la sakfajfistoj kaj la tamburistoj aliflanke. Densa popolamaso en ronda ĉirkaŭiris la fajron, tre atentante la mirindan fajran elprovon. Malhelo kaj silento nin alarmigis. Kaj jen, ekmuzikante, du nestinarinoj eniris, takte saltante, en fajran vivkarbejon kaj pasis aliflanken. Sekundoj de terura streĉo; la nekredebla fariĝis fakto. Nudpiedaj, kun ikonoj enmane, „vâh-ante“, la nestinarinoj vadis en la viva stiparo, dika unu manetendo kaj kvazaŭ sentis nenion kaj suferis nenian doloron kaj nenian bruligon. Kaj tio daŭris tutajn kvin minutojn, kvin terure longajn minutojn, kiuj estus sufiĉaj, por esti morte vundita ĉiu alia dancanto, nesubtenita de la vizio de la sanktulo, ne transforminta sian animon ĝis profeta ekzaltiĝo.

La tamburo kaj la sakfajfistoj eksilentis, la danco finiĝis per krucsigno de la nestinarinoj kaj la procesio revenis en la „ĉefejon“ por ke la maljunuloj kaj nestinarinoj sidiĝu je pia sankta vespermanĝo, metita sur etendita knedtuko meze de tiu preĝeja cirkonstancaro. Mirigita de ĉio vidita, plenigita ankoraŭ de la travivita, mi observis la trankvilajn nun aktorojn en mistika dramo, kies antikvaj paraleluloj elstaris en mia imago kiel komentario kaj prafonto de la konservita ĝis nun rita kutimo.

Ĉar sendube tiuj „nestinaroj“ (t. e. dancantoj sur fajro, el la greka vorto

„estia“, „nestia“, fajro) nin kondukas al antikvaj orientaj misteroj, kaj precipe al la religio de la persa Mitra kaj kelkaj antaŭaziaj sinkretikaj (miksitaj) kultoj, kiuj sciis la samajn fajrajn elprovojn, la samajn procesiojn al sanktfontoj kaj la samajn konsekrojn. La celo estis ĉie la sama; tia ĝi restas parte ankaŭ ĝis nun: gajno de kompto de la dio (la sanktulo) por sano kaj fruktabundo, forpelo de malsanoj, akiro de talento por profetaj vizioj kaj revelacioj, liberigo de moralaj turmentoj kaj savo de la subpremita animo en pli alta mondo, per komunado aŭ kunligado kun la dia principo, per mistika „renaskiĝo“. Unuaplane elstaras nun, en tiu krudiĝinta vilaĝa medio, la materialaj intereso, la timo de

malsanoj kaj nefruktabundo, la kuracado de nervaj malorganizoj; sed sendube iam superregis pli altaj spiritaj bezonoj por liberiĝo de la pekŝarĝo kaj por intima kuniĝo kun Dio, kiel fonto de ĉiu vera feliĉo. La ekstazo estas vojo al „nova lumo“, rimedo por plenigo de la animo per dia forto.

Tiamaniere la nuna bulgara kutimo konservita en la senbruaĵoj kaj forŝiritaj de la mondo montregionoj de Trakio kaj alportita iam el Oriento, atestas al ni, kiel lasta eĥo, pri majesta religia sistemo kaj pri mondrigardo, kiu estis konsolo kaj forta apogo en la vivo dum tutaj jarcentoj antaŭ la kristaneco.

Trad.: I.H.K.

kun permeso de l'aŭtoro

Vortaro*)

6-a oficialna прибавка на универсалния речникъ

(корени приети отъ Езиковия комитетъ)

angoro 1. Malsaneca sento de sufoko kun korpremateco; 2. sento de sufoko, kaŭzata de timo, maltrankvileco, голѣмо безпокойствие, м ж к а, страхъ.

aperturo malfermaĵo, отворъ, отворстие.

aplombo tre granda memfido; nekonsternebleco, самоувѣренность.

arbusto (бот.) arbeto, kies trunko estas ligneca ĉe la bazo kaj herbeca ĉe la supro, храстъ, шубръка.

aŭguri diveni per esotera povo, предвещавамъ.

aŭreolo 1. luma rondo ĉirkaŭ la kapo de sanktulo ĉe pentraĵoj; 2. prestiĝo, сияние, венецъ, ореолъ.

baletto teatra senparola danco kun muziko kaj mimiko, балетъ.

bankiero posedanto de banko, банкеръ.

gramofono (акуст.) aparato, kiu, per disko, reproduktas sonojn, грамфонъ.

grego (зоол.) kolekto da brutoj, birdoj aŭ da homoj, стадо.

honorario nepериода pago por servo, plej ofte de persono, kiu praktikas liberan profesion, ekz. advokato, ku-

racisto, хонораръ.

ingredienco (хим.) ĉiu aparta substanco, kiu konsistigas miksaĵon, съставна часть.

koncesio oficiala rajtigo, концесия, позволение.

konduktoro oficisto, kiu akompanas, publikan veturilon, ne kondukante ĝin, sed plenumante difinitajn devojn, koncerne ĝian funkciadon, кондукторъ (на влакъ, трамвай и пр.).

монотона 1. unutona; 2. enuiga kaŭzo de manko de diverseco, монотоненъ.

strebi energie streĉi la fortojn de la korpo aŭ de la spirito por atingi ian celon, сила се, старая се, помогавамъ се.

susuri eligi sonon malfortan kaj iom sekan, kiel de atlaso, silko, ĉifita papero k. s. шумя, шумоля.

ŝrumpi kuntiriĝi kvazaŭ de sekiĝo, набръчквамъ се.

vinkto (инд.) metala peco uzata por riparigi porcelanaĵojn ктп. нитъ, перчимъ.

vivisekcio (анат.) operacio praktikata sur vivanta besto por studi fiziologiajn fenomenojn, вивисекция.

vizio imagata objekto, kiun aperigas aŭ Dia revelacio, aŭ iluzio de la vido-sento, призракъ. (при)видение.

*) Вж. 5-та прибавка въ бр. 3-4 на В.Е. Прибавете ги къмъ Кръстановия двоенъ речникъ.

Nia vivo

Sofia. La ĉefurbo travivis kelkajn gajajn tagojn protektitajn ankaŭ de bela maja suno. Multnombraj gastoj el fremdlando kaj el provinco kaŭzis tutajn festojn kaj trikoloraj flagoj senĉese gajigis la okulojn. Koncertoj, teatraĵoj, ekspozicioj, maĉoj, aŭtobusoj ktp. ne ĉesis. Sed la plej rimarkinda estis la bunta manifestacio je le 11/24. majo, kiam solene estas honorata — precipe de la lernantaro — la memoro de sanktaj fratoj Kirilo kaj Metodjo, la bulgaraj kaj tutslavaj klerigantoj. Estas atentinde, ke la plej granda nacia festo, kiu kunigas ĉiujn aĝojn, klasojn kaj profesiojn, estas festo de klerigo. Dank' al tiuj apostoloj, la bulgara popolo jam en IX-a jarcento havis florantan nacian literaturon en nacia lingvo kun bulgaraj literoj. En la komenco de junio la studentaro brue festis la Botjov'an tagon, kaj junularo kaj maljunularo la „Tagon de la rozoj“.

Esperantisoj gaje ĉie partoprenis

— La grupo de la blindaj esp. „Balkana Stelo“ aranĝis la 9. VI. matenfeston kun sceneto „Apud la lulilo“ de la lernantoj ĉe la Ŝtata porblindula instituto, kie esp. estas oficiale instruata.

— Nia C.K.-ano s-ro Kiro Georgiev dum sia lasta vojaĝo tra Centra Eŭropo plenkore propagandis en la vagonaroj precipe inter la belseksaninoj.

v. Buĉin-prohod, Sofijsko. Nia samideano pastro Boris Angelkov fervore propagandas en la pastraj rondoj.

v. Galiĉe, Orehovsko, S-ro V. Gerĝikov gvidas kurson, kiun partoprenas ĉiuj geinstruistoj, la kuracisto kaj la pastro.

Pirdop. La solenan popolan honorigon de la verkisto T. G. Vlajkov je la 19. V. 35 ĉeestis ankaŭ nia redaktoro s-ro Krestanov.

Plovdiv. Laŭ iniciativo de C. K. de B. E. A., la loka societo „Kulturo“ aranĝis je la 5. majo konferencon, kiun partoprenis pli ol 60 esp-istoj el la tuta lando: Sofia, Ruse, Varna, Pazarĝik, Batak k. a. Paroladis la sekr. de BEA. Oktomvrijski, la prez. de la loka esp. soc. Stojev, la sekr. de la sama Malĉev, Sapunĝiev, P. Toŝkov k. a. Estis interŝanĝitaj ideoj pri estonta propagando kaj opinioj pri agadmaniero: ne kolere, sed taktike,

servante al si per monstro de nerifuteblaj faktoj, konvinkante la skeptikulojn kaj mokulojn pri la seriozeco de nia movado. Ĉiuj revenis hejmen kun pliigita entuziasmo kaj pli forte batataj koroj por la komuna afero, kaj la loka societo ne bedaŭras, ke ĉi sukceso kostis malplenigon de ĝia kaso. Estis telegrafe salutita ministro Jotov, nia samideano.

— La printempa specimena foiro-ekspozicio belege impresis kaj bonege sukcesis pro sia moderna kaj laŭgusta organizo. Pli ol 220,000 vizitintoj admiris la diversbranĉajn produktaĵojn de la bulgara nacio, kiu atingis kaj eĉ superpasis la kvaliton de la Okcidenteŭropaj. Ĝi estas vera mezurilo pri la progreso de la tutbulgara ekonomio kaj industrio, de kiu ĉiuj estis agrable surprizitaj. La foira direkto enkondukos venontjare ankaŭ esperanton, dank' al insista rekomendo de la C. K. kaj de la loka esp. societo.

Ruse. Societo „Espero“ vigle agadas. La 13-an de aprilo ĝi aranĝis en la societa klubo Zamenhofan rememoresperon, vizititan de 85 p. La sekretario prelegis je temo: „Zamenhof kaj lia testamento“. Poste s-rino P. Lazarova parolis pri la vivo de nia majstro. S-ro L. Dimitrov tra legis propran verkon: „La tragedio de Zamenhof“. Deklamis s-ino S. Deĉeva kaj la 4-jara knabino Joana Konova kantis: „Espero kiel ond'“ kaj „Ĉiutage. . .“ Sekvis popolaj kaj modernaj dancoj ĝis la unua mateno.

Pro diversaj cirkonstancoj en la komitato de societo „Solidareco“ fariĝis kelkaj ŝanĝoj: anstataŭ s-ro E. Zorov, kas, kiu ekŝiĝis, eniris s-ro D. Naĉev; anstataŭ la ĝisnuna sekr. J. Nikolov, kiu restas kiel konsilanto, eniris s-ro Iv. Kovaĉev.

Nia fervora propagandisto P. G. Pamporov faris en Litovujo kelkajn sukcesajn paroladojn pri Bulgarujo.

La Veterinaroj esperantistoj sin turnu al D-ro Georgi pop Ivanov, distrikta veterinaro, Orehovo (Bulgarujo), kiu nun redaktas la „Internacia Veterinara Revuo“-n.

Imitinde! Nia malnova samideano Krum Mlaĝov, tabakeksperto el Dup-

nica, nun loĝanta en Sofia, donacis al la kaso de BEA 400 (kvarcent) levojn por helpi la esp. movadori. Koran dankon al tiu malavara donacinto.

— Nia fervora samideano Stefan Gančev jam dufoje pruntedonis senrekompence po 500 (kvincent) levoj al la redakcio de B.E. por pagi la presiston. Ankaŭ al tiu mecenato tutkoran dankon! Kiu imitos ilin?

Esperanto utilas. El ĉiuj fremdlingvaj prospektoj pri marbanloko Varna, la esperantaj eldonaĵoj plej rapide elĉerpiĝis. Nun estas preparita nova eldono, prilaborita de nia redaktoro.

се списва на всички езици, както на италиански, така и на български. Но само ние двамата дигнахме ржка за нашето собствено предложение, понеже всички други поискаха да се списва само на английски, френски и нѳмски. . ."

Есп. клубъ. Както е известно, покойната съмишленка С. Ножарова чрезъ своето завещание подари на Соф. есп. д-во сумата 100,000 лв. за покупка на есп. домъ. Бълг. правителство не се съгласи да се опростятъ безвъзмезднитѣ мита, въпрѣки многократнитѣ постѣпки на Ц. К. въ



Esper. societo „Espero“ okaze de la 34-a datreveno de ĝia fondiĝo kaj de la 75-a detraveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof.

Nia red. s-ro Krestanov, post gajnita konkurso en la Ministerio de fervojoj, poŝtoj kaj telegrafoj, ricevis la postenon de informanto ĉe la ĝenerala direkcio de la bulgaraj ŝtatfervojoj kaj havenoj en Sofia, str. 6. Septemvri, 23. Ni gratulas lin kaj bondeziras al li sukceson en la nova ofico.

Есперанто е нуженъ! Проф. Ал. Балабановъ описва въ „Миръ“ конгреса на Пенклубоветѣ въ Барселона и казва буквално следното: „И почнаха следъ това едни забъркани дебати, цѣла вавилония за общото списание на кои езици да се списва.

Маринети и азъ предложихме да

М-вото на финанситѣ. Чистата сума отъ 75,000 лв. ще се получи и употребѣи въ скоро време за целта.

Министерството на нар. просв. обещава да помогне парично на бълг. делегатъ на есп. конгресъ въ Римъ, тѣй като само не ше може да прати такъвъ.

Ливерпулскиятъ университетъ е въвелъ есп. въ програмата на изучаванитѣ езици въ 1 год. — 2 часа седмично.

Съветската поща е въвела подруския и френския надписи на затворенитѣ и отворенитѣ писма и есперантски текстъ. Ето още едно офи-

циално признание на международния езикъ.

XXIV-иятъ белгийски есп. конгресъ се състоя на 8—10. юний т. г. въ Брюжъ подъ почетното председателство на Н. В. Кралъ Леополдъ III. Играна е била и едноактната есп. комедийка „Nubetoj“ и имало грандиозенъ балъ.

„**Продана Невеста**“ отъ Сметана е била предадена на есперанто по радио Бърно. По тоя поводъ сж получени 1178 поздравителни писма на есперантисти отъ 23 страни на Европа, Азия и Америка. Тоя небивалъ

via artikolo, tradukaĵoj kaj vojaĝpriskribo. Ankaŭ la Dânova fabelo liveris al mi grandan ĝuon. Vi pravas, ke ni, la legantoj, ne devas lasi al vi la tutan verkadon de la revuo. Honton al ni, se ne troviĝos areto da kapablaj verkemuloj por plenigi la malmultnombrajn paĝojn de nia B. E.“! D-ro Agro, Кнежа. „Via gazeto ege plaĉas al mi. Laŭ stilo kaj enhavo mi konsideras ĝin unu el la plej belaj esp. gazetoj“.

E. van Veenendaal, red. de „La Juna Vivo“, Nederlando. „Mi ricevatestas vian afablan sendaĵon de la n-ro 5-6 de B. E., zorge redaktata



Novaj pioniroj de esp. en Varna, kurso gvidata de s-ro G. Sapunĝiev en 1935.

успѣхъ доказва, че идеята за междунар. езикъ здраво е влѣзла въ общественя животъ на човѣчеството и е фактъ и факторъ, който не може повече да се отрича.

ONI LAŬDAS

„Al mi tre praĉas nun B. E.“

A. P. Vaĉev, Trojan.

„Ankaŭ miajn dankojn akceptu pro la bela redaktado de B. E.“

G. Stanev, Orehovo.

„Ni rekomendas B. E. kiel bone redaktitan kaj interesan literaturan gazeton“.

La Suda Stelo, Jugoslavio.

„Antaŭ kelkaj tagoj mi finlegis la lastan n-ron de B. E. kaj multe plaĉis al mi

kaj okulĉarma periodaĵo el via ŝatata lando. Mi multĝoje ricevos ankaŭ la sekvontajn“.

V. L. Vanweddigen, red. de „Nieuwe Eeuw“, Nederlando.

„Mi tre dankas vin por B. E., kiun vi afable sendis kaj mi legis ĝin kun granda intereso. Bonvole akceptu miajn koraĵajn gratulojn pro via longa kaj sukcesa batalo por la diskonigo de nia lingvo. Mi kredas, ke la plej granda sukceso estas, ke niaj spertuloj montris al la mondo, ke esp. facile povas konigi la plej belan literaturon de ia lando al diverslingvaj alilanduloj tra la tuta mondo. Mi mem ĉiam memoros viajn leterojn, verkojn kaj vizitojn kun plezuro“.

H. W. Southcombe, Anglujo.

ОКРЪЖНО на Б. Е. С. № 365 отъ 4. VI. 1935 г.
До есп. дружества въ България.

Драги съидейници,

Централниятъ комитетъ на Б. Е. С. въ заседанието си на 3. т. м., следъ като взе предъ видъ:

че нѣкои отъ съюзнитѣ др-ва още не сж внесли следващитѣ се за съюзната 1934—35 г. членски вноски;

че желателно е отчетътъ на съюза да бжде приготвенъ поне 15 дни преди конгреса;

че съгласно конгресното решение всички др-ва трѣбва да внесатъ по 50 лева за членуването на съюза въ У. Е. А.;

че право на делегати въ предстоящия XXII. конгресъ, който ще се състои на 21. 22. и 23. юлий т. г. въ Варна, ще иматъ само д-вата, които сж се напълно отчетели,

РЕШИ да предупреди за последенъ пжть ржководителитѣ на съюзнитѣ два най-късно до края на месеца всички да се отчетатъ. Всѣко закъснение следъ горната дата лишава д-вото отъ официаленъ представителъ въ заседанията на конгреса.

Презъ този месецъ трѣбва всѣко д-во да свика общо събрание и избере делегатитѣ си за конгреса, смѣтайки по 1 делегатъ на 10 или дробъ отъ 10 отчетени къмъ съюза членове.

Ако нѣкое д-во желае да постави нѣкой въпросъ за разглеждане въ конгреса, да ни съобщи това, за да се впише въ дневния редъ на конгреса, който, изработенъ окончателно, ще ви се изпрати въ началото на юлий.

Съюзътъ е направилъ постъпки предъ Б. Д. Ж. за 70% намаление. За резултата ще ви се съобщи допълнително.

Желателно е всѣко д-во да си приготви знаме, макаръ и малко, като по възможность членоветѣ отъ едно или нѣколко д-ва пжтуватъ групово. За битовата вечеръ умоляватъ се съиденицитѣ да си донесатъ и народни носии. Тия, които могатъ да изнесатъ нѣкой литературенъ или музикаленъ номеръ, да съобщатъ на конгресния комитетъ — Варна.

Приемете нашето есперантско „САЛУТОНЪ“.

Председателъ: (п.) П. Йордановъ Секретаръ: (п.) Б. Октомврийски

Р. С. Дирекцията на Б. Д. Ж. съобщи, че конгресиститѣ ще пжтуватъ по намалената тарифа, а не съ 70%.

ADIAŬO DE LA REDAKTORO

Jen antaŭ vi, karaj gelegantoj, la lasta ĉi-jara numero de nia modesta gazeto. Kiel vi scias, B. E. estas organo ne nur de la „redakcia komitato“ kaj de kelkaj hazardaj ĝiaj kunlaborantoj, sed de la tuta bulgara esperantistaro. Ĉiu membro-abonanto rajtas kaj devis partopreni ĝian redaktadon, sendante interesajn originalaĵojn kaj tradukaĵojn. Tiamaniere estus variiginta la enhavo de la organo kaj estus helpita en sia laboro la redaktoro, kiu, pro manko de taŭga materialo, estis devigita preskaŭ ĉion mem verki sub diversaj nomoj.

Kiel ajn kaj malgraŭ siaj profesiaj kaj aliaj okupoj, mi faris ĉion, kion mi povis, kun plezuro por mi kaj kun deziro

plaĉi al la aliaj. Eble mi ne sukcesis kontentigi ĉiujn. Tio ĉi ja estus neebla, eĉ se la kolonoj de nia gazeto estus pli larĝaj. Sed mi vere klopodis plenumi ĉies deziron, zorgante antaŭ ĉio por la bono de nia komuna afero. La multaj laŭdaj aproboj atestas, ke mi faris ion utilan, se ne ĉion necesan.

Nun forlasante nian preskaŭ plenaĝan infanon al la zorgoj de aliaj, malpli okupitaj kaj ne malpli spertaj samideanoj, mi deziras sugestii ion. La ĉeftasko de B. E. estas kaj devas resti la jena: diskonigi esperanton en Bulgario kaj nian landon en fremdujo. Por plenumi sukcese tiun sanktan devon, ĝia amplekso devus esti pli granda, por ke la enhavo estu pli riĉa kaj varia.

Bibliografio

* *La Juna Vivo*, 1-a jarkolekto broŝurita en formo de libro, 196 paĝoj, prezo 58 levoj, ĉe la redakcio en West-Graftdyk, Nederl. aŭ ĉe la reprezentanto en Bulgarujo: s-ro Krestanov, ul. 6. Septemvri, 2, Sofia.

Tiu bela ilustrita revuo estas fondita por 10-16 jara junularo kaj por komen-cantoj. La ĉefrakontoj estas ĉerpitaj el lernejoj legolibroj kaj taŭgaj speciale por mezlernejoj. La verkistoj kaj traduki-stoj estas preskaŭ senescepte geinstrui-stoj, sciantaj la pedagogiajn postulojn por tia laboro. Preso moderna. Ni varme rekomendas ĝin al ĉiuj.

* *Imenlago* de Th. Storm, el germ. l. tradukis A. Bader, kun ĉinlingvaj kla-rigoj de Cajfonso. 80 pĝ., 0.90 sv. fr. aŭ 3 respondkuponoj, eld. Ĉina Mond-lingva librejo, 15 Shang Sieh chiaj, Pej-ping, Ĉinujo.

La konata Storm'a novelo aperis unue en „La Revuo“, jam delonge maloftaĵo. La nova vesto certe plaĉos al ĉiuj kiujn ni intsigas tuj mendi la libreton. La en-treprenema librejo meritas nian dankon kaj subtenon.

* *Esperantaj historietoj*, de Peter Frey, eldono de l'aŭtoro, Clausens vej 26, Hiderslev, Danujo, formato $13\frac{1}{2} \times 19\frac{1}{2}$, pĝ 48, prezo 35 ned. cendoj.

Per ĉi-libreto la aŭtoro intencas pre-zenti al la esp-istaro kolekton da histo-rietoj, helpante speciale al la komencan-toj trovi sufiĉe interesan materialon por legi, traduki kaj rerakonti. La lingvo kaj stilo estas bonaj. Ni rekomendas la ver-keton.

Tial ĉiuj devas klopodi, ke la membro-abonantaro grandiĝu kaj ke monhelpan-toj troviĝu. Same, ke estontece tro-viĝu pli idealema sekretario, kiu rezignu ĉiun honorarion, simile al la redaktoro. La tiel ŝparota monsumo iros riĉigi la eldonfondon de la organo por ke tiu ĉi fariĝu kapabla plenumi ĉiujn dezirojn kaj esperojn.

Kun tia deziro kaj espero mi danke adiaŭas la karajn gelegantojn kaj tutkore finkrias: Esperanto, BEA kaj BE vivu, kresku, floru!

I. H. K.

* *Besa Adresaro* de esp-istoj el ĉiuj landoj, 12-a eldono, 110 pĝ., prezo 1 sv. fr. Potštejn, Ĉeĥoslovakio.

Plaĉe presita kaj aranĝita, ĝi enha-vas pli ol 1000 adresojn el pli ol 40 landoj, preskaŭ 100 portretojn, detalan registron de esp-istoj kaj de esp. entre-prenoj ktp. Rekomendinda.

* *Svislando* — alpa poŝtaro, so-mero 1935, ilustrita informilo senpaga. Ĝenerala Direkcio PTT Bern.

* *Universala kaj internacia Brusela ekspozicio 1935*, kun plano de la ekspozicio. Senpaga.

* *Historio pri la skismo en la lab. esp. movado*. Sat, 68, av, Gambetta, Paris XX, 20 paĝoj, 2 fr. fr.

* *Kio estas Oomoto?* 5-a eldo-no. Prezo 1 sv. fr. Oomoto Centra Ofi-cejo, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

* *Fundamento de Animo*, de Onisabro Deguĉi. Prezo 0.50 sv. fr. Ad-reso kiel supre.

* *Internacia Veterinara Re-vuo*, monata organo de Univ. Veter. Asocio Esp., red. D-ro med. vet. Georgi pop Ivanov, Rahovo a. D., Bulgarujo, Jarkolekto I, N-ro 1, junio 1935, pĝ. 8, jare: 3 g. m. aŭ egalvaloro.

La unua n-ro enhavas bone redaktitan artikolon pri la celoj kaj taskoj, refera-ĵojn, red demandojn. Tia gazeto ĝis nun mankis en nia literaturo. Ni kore salutas la novan kunfraton kaj deziras al ĝi longan vivon kaj utilan laboron.

* *La Nova Turan*, esp. interligi-lo de la Turan-devenaj popoloj. red. József Mátyás, Debrecen, Vigkedvü, Hun-garujo. Jarabono 2 sv. fr., pagebla an-kaŭ per intern. poŝtaj respondkuponoj.

Kvankam ni ne vidas ian specialan utilon de nova popolarpartigo, ni rekomen-das tiun gazeten pro ĝia bona esp. stilo.

* *Нашитѣ сили* — какъ да ги изпользуваме, отъ. П. Мълфордъ, прев. Ел. Г. Консулова-Вазова, стр. 128, ц. 25 лв. София, ул. Царь Крумъ, № 41.

* *Българска Национална стенография* отъ Георги Ботевъ. предговоръ отъ проф. Я. Тодоровъ, стр. 40, цена 40 лв., издание на авто-ра — стенографъ при Нар. събрание, София.

* Татковитѣ приказки з нея, отъ Venitta, София 1935, стр. 49, цена 5 лв., адр.: Невѣна Недѣлчева, бул. Фердинандъ, 43, София.

* Кой кого уплаши? — приказки въ стихове отъ Трайко Симеоновъ, цена 10 лв.

* Заю-Баю радиолюбитель, стихове и разказчета отъ Ат. Душковъ, цена 15 лв. Издава: Добромиръ Чилингировъ, бул. „Кн. Карлъ Шведски“ 37, София IV.

* Нова руска литература, отъ Ен. Николовъ, гимн. учителъ — библиотека „Литературни разбори“, стр. 160, цена 20 лв. Издание на книгоизд. „Факелъ“.

* История на българския езикъ, отъ проф. д-ръ Ст. Младеновъ, № 3 отъ библиотека „Литературни разбори“, уреждана отъ г. г. Еню Николовъ и Цвѣтачъ Минковъ. Стр. 136, цена 25 лв. Доставка книгоиздателство „Факелъ“. Препоръчваме ги и дветѣ.

* Българска енциклопедия. Въ нея се даватъ всички съществени знания изъ разнитѣ области на науката, изкуството и живота. Тя съдържа надъ 40,000 заглавия, отъ които 6,000 само за България: земеописание, минало, книжнина, природа и пр., въобще цѣлия исторически и културенъ животъ на българския народъ, освенъ това Енциклопедията ще има около 3,600 илюстрации: предмети лица, изгледи, паметници и пр., 7,200 биографии на видни личности: учещи, писатели, художници, пълководни, държавници и пр. 2,400 географски описания на страни народи, племена и чудеса на природата изъ цѣлия свѣтъ и пр. Всичко това събрано въ единъ томъ отъ около 1600 стр. Този трудъ, който е изисквалъ многогодишна работа, е дѣло на братя Данчови при съдействието на мнозина видни наши учени и общественици. Българската енциклопедия ще излѣзе наесень и ще струва 600 лв., а за предплатили 360 лв. Допускатъ се и по-малки вноски. Адресъ: Ст. Атанасовъ, София, ул. „Н. Рилски“ 36.

* Хора безъ покривъ, соц. романъ отъ Д. Константиновъ, изд. „Бълг. книга“, София, 80 стр., 25 лв.

* Ржката на провидението, отъ Селма Лагерльофъ, прев. Сапунджиевъ, библи. „Ведрина“, Варна, стр. 48, ц. 5 лв.

* Болестъта ракъ, отъ д-ръ Ас. Хаджиоловъ, библи. „Човѣкъ“, София, 24 стр., 10 кн. 80 лв.

* Цененъ приносъ въ преводната ни литература е предприетото издаване пълното събрание съчиненията на Дж. Лондонъ. Преводитѣ сж пълни и хубави, отъ наши първи преводачи и литератори. Джекъ Лондонъ, най-любимия днесъ писателъ навсѣкжде, трѣбда да влѣзе и въ всѣка българска библиотека. Томоветѣ се предлагатъ и получаватъ отъ абонатитѣ на части — всѣки два заедно за 50 лв., или първитѣ до сега 8 — изведнѣжъ за 200 лв. Адресъ: сп. „Страници за всички“, ул. Ц. Иоанна № 7 — София.
I. H. K

DEZIRAS KORESPONDI:

S-ro Dim. K. Stoev, vilažo Velkovci, obština Bojanska, okolia Gabrovska, Bulgarujo.

F-ino Bela Süßmann, ul. Mutkurov, № 58, Russe, Bulgarujo.

S-ro pastro B. Angelkov, v. Bučinprohod, Sofijsko, Bulgarujo.

S-ro Prokopij V. Dragolov, instruisto, v. Bâlgareni, Svištovsko, Bulgarujo.

S-ro Pančo St. Daskalov, v. Boboševo, Dupniško, Bulgarujo.

F-ino Kina Dermengieva, frizistino, vilažo Kilifarevo, Tirnovsko, Bulgarujo.

S-ro St. Gergikov instruisto, v. Lâkavica, Asenovgradsko, Bulgarujo.

S-ro Georgi Hristov, v. Kričim, Plovdivsko, Bulgarujo.

Senpage sendas esp. librojn kontraŭ aer- aŭ jubileaj poŝtmarkoj — s-ro Hermann Röllig, Goblonz a. N., Wassergasse 7-a, Ĉeĥoslovakio.

Abonu „La Juna Vivo“-n, dumonatan gazeton kun facilaj legaĵoj kaj multaj ilustraĵoj. Jarabono: 58 levoj. Adreso: West-Graftdyk, Nederlando, aŭ ĉe la red. de B. E.